


esperanto



JANUARO 1992 • 85-A JARO • N-RO 1033 (1)

ISSN 0014-0635



Super la oka milo:
Kie la tegmento?

Enhavo

- 1 Novjara mesaĝo de la Prezidanto de UEA: Konstrui, konservi kaj feliĉigi (John Wells)
Por plia jaro de kresko
- 2 Informado: De Freŭdo ĝis niaj informbudoj (1) (Ivo Durwael)
- 3 IKS ne fermis la pordon
- 4 2-a Afrika Kongreso: Afero de infanoj kaj gejunuloj (Simo Milojević)
- 5 Azia movado: Monda lingvo mondopinte (Joachim Werdin)
- 6 Renkontiĝoj: La jarfina familia festivalo (W. F. Huppertz)
La junaj mond-esplorantoj
- 7 Zamenhof-premio al UN-diplomato Sir Brian Urquhart
- 8 Interskipe: Ideologo stafetas al memservisto
- 10 Mondfederismo: Homa strebado al dia projekto (AGOU Takaŝi)
- 11 Reaĝoj: Ĉu ŝanĝi la homojn aŭ nin mem? (Joan Phillips);
Olomouc: pli okcidenta en oriento (Richard A. Earnhart);
Nur poŝtojn ne eblas subtaksi (Carlo Gazzelli); Du malsamaj fazoj
en Eŭropo (Jean-Louis Texier); Por demokrata, senpartia MEM
(Gerrit Berveling); Pagipovaj ĝemeloj (Jacques Verdier); Kvar kritikaj
konstatoj (Wu Guojiang); Restas nur Kajto (Petro S. Kaiz)
- 12 Recenzoj: *Nova Esperanta krestomatio* (Edwin de Kock); *Zamenhof, Doctor Esperanto* (Francisco Veuthey); *Work Brings Happiness* (Johano Rapley); *Enkonduko al problemsolva originala KJ-metodo* (Christer Kiselman); *Aerlumo, Aaron brazilumas Esperante* (Seán Osborne)
- 15 Laste aperis... (novaj eldonaĵoj en aŭ pri Esperanto)
Esperanto en radio
- 16 Kalendaro 1992 (internaciaj Esperanto-aranĝoj ĝis julio 1992)
- 18 Nekrologoj; Loke (mallongaj novaĵoj)
- 20 Oficiala informilo; Anoncoj

Vi trovos

eble nedeca ke du redaktoroj (eksa kaj eka) tiom parolu pri si kiel Marko kaj mi faris (p. 8-9) . . . precipe kiam la revuo tiel malfruas kiel nuntempaj Sed kredu min, gesinjoroj: jam la februara numero malfruas malpli malfrue ol tiu ĉi. Ni nepre ne volas riski Vian mal-kontenton, kiam la membronbomo de UEA kreskas tiel kontentige kiel Vi povas vidi transpaĝe. Ĉu ni devas danki tiun kreskon al pli bona strategio de informado? Eĉ se jes, indas pliklerigi pri psikologio per plurparta eseo de ĉi-faka UEA-estranaro Ivo Durwael (p. 2-3) . . . por ke ni agadu efike kaj eĉ efekte en Azio, kiun travadas Joakimo Verdeno, kaj Afriko, kiun ensaltis Simo Milojević (p. 4, 5). Aliaj kontinentoj elrampos la rubrikon "Loke" jam en nia sekva numero! Tamen, Brazilo sambas por Vi jam ĉi-okaze (p. 14).

La kovrilo montras vertigan perspektivon, ĉu ne? Ne maltrankviligu: la Centra Oficejo de UEA plu firme staras. (Fotis Thomas Geller)

esperanto

Oficiala organo de
Universala Esperanto-Asocio
(en konsultaj rilatoj kun UN kaj Unesko)

Aperas monate (escepte de aŭgusto).
Fondita en 1905 de M. P. Berthelot (1882-1910); **establiĝita** kiel organo de UEA en 1908 de Hector Hodler (1887-1920). **Legata** en 115 landoj. **Vocilegata** por blinduloj.

Redaktoroj: István Ertl.

Abonprezo: varias laŭlande (gld. 55,12; US\$ 27; GM 48; enoj 3960; ktp); petu informojn ĉe via landa asocio aŭ de la ĉi-suba adreso. Unuopa ekzemplero kostas 5,00 gldenonj.

Anonciarifo (gld.): 1 p. 1760, 1/2 p. 970, 1/4 p. 540, 1/8 p. 300, 1/16 p. 170. Movada rabato 50%. Eksterakovrilaj anoncoj kostas duoble. Rabato por tuja ripeto 20%.

Adreso de la Centra Oficejo de UEA: Nieuwe Binnenweg 176, 3015 BJ Rotterdam, Nederlando.

Telefono: +3110 436 10 44 kaj 436 15 39.

Telafakso: +3110 436 17 51.

Teltekso: 23721 uxa nl.

Telegramoj: ESPERANTO ROTTERDAM.

Banko: Bank Mees & Hope, Postbus 749, NL-3000 AS Rotterdam (konto n-ro 25.52.89.804). Nederlanda poŝta ĝirkonto: 37 89 64 (ĝiroficejo Den Haag).

Ĝenerala Direktoro: Simo Milojević.

Direktoro de la CO: Osmo Buller.

Estraro de UEA

Prezidanto (kunordigado, planado): prof. d-ro John C. Wells, 5 Poplar Road, London, Britio SW19 3JR; tel. (081) 542 0302; telefakso (071) 383 4108.

Vicprezidanto (regiona agado, turismo, Fondumo Zamenhof): s-ro Roman Dobrzyński, u. Majdanska 13 m 91, PL-04-088 Warszawa, Pollando; tel. (22) 10 35 05.

Vicprezidanto (eksteraj rilatoj, esperantologio): d-ro Ulrich Lins, Gemarckenstr. 150, D-W-5000 Köln 80, FR Germanio; tel. (0221) 890 32 50.

Ĝenerala Sekretario: s-ro Ian Jackson, 29 Graham Road, London W4 5DR, Britio; tel. (081) 995 6244; telefono 8959991 caward g; telefakso (071) 726 8561.

Estraran (informado): s-ro Ivo Durwael, Paul Gilsonlaan 5, B-2650 Edegem, Belgio; tel. (03) 440 30 92.

Estraran (financo, junularo): s-ro Grégoire Maertens, Pr. Leopoldstr. 51, B-8310 Brugge, Belgio; tel. (050) 35 49 35.

Estraran (landaj kaj fakaj asocioj): s-ro Oszkár Princz, Sallai u. 4. II./3, H-1136 Budapest, Hungario; tel. (HEA) (1) 15 60 244.

Estraran (azia agado, aplikado en scienco): prof. d-ro So Gilsu, Yangchon PO Kesto 11, Seoul - 158-600, Korea Respubliko; tel. kiel telefakso (02) 646 5413.

Estraran (kulturo): s-ro Spomenka Štivec, Nova Ves 87, YU-41000 Zagreb, Jugoslavio; tel. (041) 42 92 51; telefakso (041) 42 12 94.

Esperantistaj (Internacia Ligo de Esperantistaj Instruistoj [ILEI]): s-ro Stefan MacGill, Essé ut. 7 III, H-1034 Budapest, Hungario; telefon-mesaĝoj kaj telefaksoj per HEA, (1) 15 60 244.

Observanto (Tutmonda Esperantista Junulara Organizo [TEJO]): s-ino Saskia Idzerda, Bruchwiesenanlage 4, Z. 801.4, D-W-6602 Dudweiler, Germanio; tel. (06897) 765402.

Konstrui, konservi kaj feliĉigi

Ĉe la sojlo de nova jaro, konvenas paŭzi momenton por taksii nian situacion. Kion instruis al ni 1991? Kiajn perspektivojn proponas 1992?

Inter la fortoj de la Esperanto-movado, kiel indikas la Strategia Plano de UEA, estas la granda lojaleco de nia membraro. Tio montriĝis ankaŭ en 1991. La unuan fojon en sesdek jaroj, la nombro de individuaj membroj de UEA superis ok mil. Gratulon! Alia forto estas la tradicio de Universalaj Kongresoj; tiu de Bergenon kombinis neatendite grandan nombron de partoprenantoj kun bona sukceso ĉe la enlanda gazetaro kaj televido.

Inter niaj malfortoj, laŭ la sama dokumento, estas la neprofesieco de la Esperanto-movado. Ni tro multe dependas de volontuloj – ja sindonaj, fervoraj volontuloj, tamen neprofesiaj. Nun ankaŭ la landaj asocioj de orienta Eŭropo, kiuj ĝis nun povis dungi relative grandan personaron, devos lerni funkcii plejparte ĝuste per volontuloj. Tamen, malgraŭ la malfacilaj kaj komplikaj cirkonstancoj en la post-komunisma orienta Eŭropo, ĉe la Dua Eŭropa Esperanto-Forumo en Kaunas, Litovio, regis (kiel raportite en la novembra numero de *Esperanto*) modera optimismo.

Plej gravas nia kapablo utiligi la ŝanĝigantajn cirkonstancojn en la mondo. Dum la orienteŭropanoj



kaj eks-sovetianoj devas lerni tute novan stilon de organizado kaj financado, en okcidenta Eŭropo ni atestas la ĉiam pli intiman integriĝon de la diversaj landoj de Eŭropa Komunumo. Al tio, logike, ni povas ligi la lingvan demandon. Eĉ se la tajdo al komuna merkato kaj kreas monon ne jam kunportas Esperanton, ĝi kreas kondiĉojn kiuj perfekte taŭgas por ĝia plua disvastigo.

La internaciaj kontaktoj, same personaj kiel publikaj, estas nun pli intensaj, ol iam ajn antaŭe en la monda historio. Internacie ni telefonas, ni faksas, ni rigardas televidon, ni skribas, ni legas, ni vojaĝas, ni studas, ni ferias, kiel neniam povis pli fruaj generacioj. Esperanto estu preta por faciligi kaj akceli tiujn kontaktojn, en unuiganta Eŭropo kiel en ĉiuj aliaj partoj de la mondo.

Nia movado havas ankaŭ gravan porpacan mision, kiu bedaŭrinde fariĝis pli aktuala dum la pasinta jaro ol dum multaj jardekoj. Unuflanke ni povas ĝoji, ke la disfalo de Sovetunio okazis preskaŭ sen sangofluro; kaj ni forte esperas, ke la eks-sovetianoj pace travivos ankaŭ la grandajn ekonomiajn perturbojn, kiuj certe sekvos. Ne sen sangofluro, ve, estis la disfalo de Jugoslavio. La esperantistoj estas en la unua rango de tiuj, kiuj volas vidi pacan solvon al la suferoj de tiu kompatinda lando, kies popoloj ludis kaj ludos grandan rolon ankaŭ en nia movado. Validas ankorau la alvoko de Zamenhof, ke ni pledu ne por genta ŝovinismo, sed por vera patriotismo, “kiu ĉion konstruas, konservas kaj feliĉigas”.


John Wells

Por plia jaro de kresko

8051 individuaj membroj en 113 landoj: tia estis la stato de UEA fine de la pasinta jaro. En la lastaj sep jaroj, la Asocio kreskis je pli ol 25%, atingante ankaŭ novajn landojn kaj landajn asociojn. La kresko mem estis mondskala: Brazilo, Finnlando, Francio, Koreio, Ruslando kaj Usono estis inter la pintaj landoj. Plivigliĝis ankaŭ la solidara donacado de kotizoj: 500 homoj en 1991.

La nun komenciĝanta jaro donos multegajn ŝancojn por allogi novajn membrojn. UEA eldonos malgrandan manlibron pri siaj agadoj kaj servoj, kaj novan katalogon de sia libroservo. La revuoj *Esperanto*, *Kontakto* kaj *TEJO tutmonde*, sub novaj redaktoroj, strebos ankorau pli bone respondi al la intereso kaj deziroj de la legantoj. Kaj la 77-a Universala Kongreso en Vieno provizos taŭgan kulminon, en la koro de unuiganta Eŭropo.

Helpu al ni daŭrigi nian kreskon! Prezentu UEA al viaj konatoj, varbu viajn amikojn, donacu foje al Fondajo Canuto – kaj ne forgesu rektizi mem por ĉi tiu promesplena jaro. mf



De Freŭdo ĝis niaj informbudoj (1)

Novaj esperantistoj ofte atestas pri la unika etoso en la Esperanto-movado. La kontaktoj kun la ekstera mondo ne estas tiel brilaj. Tion pravas la fakto, ke amaso da homoj ankoraŭ ignoras la lingvon, kiu jam dum pli ol cent jaroj pruvis sian taŭgecon. Aktivuloj kiuj streĉas sin por malhelpi tion estu informitaj pri la – foje epokfaraj – malkovroj en la lastaj jardekoj de la psikologio rilate al la homaj kontaktoj. Sed same kiel aŭtovendisto ne devas esti mekanikisto, sed havu nociojn pri tio kio estas sur la merkato, ni ne devas fariĝi psikologoj, sed almenaŭ koni kelkajn trajtojn de la moderna evoluo. Tial mi provas – supraj – skizi tiujn novaĵojn en la evoluo post la dua mondmilito, kiuj estas ekstreme gravaj por tiuj kiuj volas flegi la kontaktojn kun la neesperantista mondo.

Dujara Karlein petole kuras inter la multaj nekonataj homoj en la Esperanto-klubo, foje tuŝas objektojn, foje krietas al iu homo, kvazaŭ ŝi hejmus tie. Subite ŝi alrigardas min, surpriziĝas, videble ektimas kaj rekuras al panjo. Ŝi estas tro juna por juĝi ke mi estas doĉa, sendanĝera viru kiu amas infanojn. Sed sendube io surprizis ŝin. Eble mi estas la unua barbulo kiun ŝi renkontis. La timo estis nur kelksekunda, ĉar mi intence iom forturnis min de Karlein. Ĉar mi ofte rilatas kun infanoj, mi komprenas ke mia altrudo pliakrigus ŝian timon. Kelkfoja – aŭ eĉ unufoja tre intensa – malagrabla sperto kun barbulo povus provoki decidon ĉe Karlein: ĉiam kaj ĉie malŝidi kaj malŝati barbulojn. Ĉiu ajn homo prenas amason da tiaj decidoj en la infanaĝo . . . kaj bedaŭrinde forgesas revizii la plimulton en pli matura aĝo. Estas evidente ke tio ege malhelpas niajn eblecojn por sinceraĵ rilatoj.

Ni ŝuldas la supran malkovron al Sigmund Freud. Kaj nuntempe pli-malpli ĉiuj intelektuloj scias ke la plimulto de la psikaj malsanoj originas el traŭmatoj en la infanaĝo. Sed tie ankaŭ plej ofte finiĝas niaj konoj. Ankaŭ nun psikiatroj kaj psikologoj rekonas la freŭdan malkovron. Sed pli kaj pli oni kontestas lian kuracmetodon. Lia psikanalizo celis remalkovri jam ne plu konsciajn rememorojn de traŭmatigaj travivaĵoj por, post re spertado de ĉiuj akompanaj sentoj, elimini ilin. Tio estas longdaŭra kuracmetodo, kiu bedaŭrinde ankoraŭ vaste uziĝas. Eble en via ĉirkaŭaĵo vi ankaŭ konas pacientojn kiu dum multaj jaroj bezonas “sian” psikiatron kaj tamen ne esence saniga. Nu, eble la malforta punkto de la skolo de Freud estis, ke oni okupiĝis nur pri neŭrologio. Komparu tion agadmanieron kun tiu de mekanikisto kiu devus lerni sian metion nur en aŭtorbudoj!

Psikologio de sukcesoj kaj feliceco

Abraham Maslow nekondukis tute novan pensmanieron, kiam li komencis sisteme enketi ĉe “en-la-socio-sukcesintaj-homoj”: personoj kiuj ĝuas ĝeneralan aŭtoritaton kaj admiron kaj mem sentas sin bonfartaj. Li faris surprizajn malkovrojn. Ĉiuj el la personoj kiujn li enketis, raportis pri pli-malpli regulaj “ekstazaj” spertoj, kiam nocioj pri tempo kaj loko ŝvagiĝis, kaj kiam la koncentroj havis la impreson ke iliaj eblecoj estas ekstreme

Ofta kutimo de esperantistaj aktivuloj paroli pri frenezuloj kaj stultuloj . . . malhelpas plivastigi la spektron de niaj adepto.

grandaj. Ni plej bone komprenas pri kio temas, kiam ni rememoras unuan enamiĝon. Mi konservas ankoraŭ klarajn impresojn pri tempo kiam duonhora kuneseto kun mia amatino aspektis senfina, kaj kiam ĉiu ajn loko kie ni kune estis, aspektis ĉiela. Por povi revidi ŝin kaj por plaĉi al ŝi, miaj energio kaj kreiveco estis pli grandaj ol mi iam antaŭe spertis.

Ekzistas homoj kiuj bezonas el-eksteran tempan premon por povi superi siajn eblecojn. Post frustracioj pro la spertita premo, la rezulto kutime kontentigas. Admirindas homoj kiuj havas kvazaŭ internan horloĝon kaj povas fini laborojn, gvidi kunsidojn, aŭ fini afercajn konversaciojn en tempo kiun ili antaŭe fiksis. Sed la instruo de Maslow estas ke tiu, kiu konstante laboras aŭ laborigas kun

horloĝo en la mano, malhelpas la sperton de intensa ĝuo, kaj tio estas agmaniero nete kontraŭa al la celo de Esperanto.

Antaŭ-kaj samtempuloj de Maslow, kiel Carl Rogers, Eric Fromm, David Riesman, Carl Jung, eĉ Søren Kierkegaard kaj multaj aliaj, parolis en renomaj studoj pri “plenfunkcianta personeco”, “aŭtonomia persono”, “interne direktita homo”, “individuigita homo” ktp, sed post Maslow tiaj epitetaj fariĝis komunaj. Psikiatroj kaj psikologoj akiris pli da sukcesoj per novaj kuracmetodoj, kiu prezentas konkretajn bildojn pri kiel sana homo funkcias. Aplaudinda fenomeno estas la ekfuroro – precipe en Usono – de literaturo por ordinara publiko. Por nia agado, gravas konscii ke la homa feliceco ne unuarange dependas de eksteraj cirkonstancoj favoraj aŭ malfavoraj, do de la hazardo, sed de la harmonia disvolvigo de la individuo. Sed individuo ja bezonas kontreni la homojn en sia ĉirkaŭaĵo por povi kreski.

Samtempe kun la krio pri nova paradigmo en la sciencoj, leviga grupo da popularaj aŭtoroj kiuj intucive avertas la publikon pri la danĝero de nia tradicia dualisma pensmaniero: se ni parolas pri malbonaj, malsukcesaj, stultaj, frenezaj, netoleremaj kaj similaj homoj, tio signifas ke ni juĝas nin mem superaj. En tia spirito ni kreas distancon kun aliaj homoj. Tiel neblas optimumigi la homajn kontaktojn kaj krei la homan fratecon pri kiu revas jam tiom da granduloj, kiel Zamenhof. Sincera malfermeo estas ankaŭ por ni esenca por veni en kontakton kun publiko kiun ni ne jam konas! Ofta kutimo de esperantistaj aktivuloj paroli pri frenezuloj kaj stultuloj ade bremas niajn eblecojn por starigi kontaktojn kun homgrupoj kiuj malsamas de niaj vivkoncepto kaj vivstilo. Tiu sinteno malhelpas plivastigi la spektron de niaj adepto.

Kaŝitaj mesaĝoj

Pli kaj pli la lingvo akiras gravan rolon en la analizo de la homaj rilatoj. Eric Berne unuafoje parolas pri la interna dialogo. Tre ofte ni ne konscias ke ni konstante konversacias kun kaj ricevas instrukciojn de niaj gepatroj, de niaj edukistoj aŭ de aliaj gravaj personoj en nia vivo, eĉ se ni ne plu vidus ilin, eĉ post ilia morto. Tiu ordonoj kaŭzas ke ni daŭrigas tradiciojn. Tio havas grandajn avantaĝojn. Sed multaj devigoj ĝenas nin kaj bremas nian disvolvigon. La Transakciaj Analizistoj instruis kiel eblas

konsciigi pri tiuj konversacioj, kiel eblas mutigi ĝenajn frazojn por trovi ekvilibron inter tradicio, racio, spontaneeco kaj kreiveco. La supraj scioj estas ege gravaj por ĉiu kiu okupiĝas pri informa laboro kaj tial ofte konfrontiĝas kun antaŭjuĝoj. Simple ne eblas trarompi antaŭjuĝojn ĉe persono kiu ne estas konscia pri tiuj internaj dialogoj.

Thomas Gordon atentigis nin pri la fakto ke ni kudas niajn mesaĝojn. Banala frazo kiel "Mi ne scias" povas esti racia sciigo, sed ankaŭ povas signifi: "Via demando ne interesas min", "Mi ne ŝatas rilati kun vi", "Vi kiel stultaj demandoj", "Mi tre ŝatus komi la respondon, vi tiklas mian scivolemon", "Vi ja scias multe pli ol mi" ktp. Tiu kiu ricevas nian koditan mesaĝon, devas malkodi ĝin kaj evidente ofte eraras. Mia seka informo "Mi ne scias" povus esti komprenata kiel "Li ne interesiĝas pri mia demando", "Mi tedas lin", "Li atendas de mi detalan klarigon" ktp. Ankaŭ tiuj lecionoj de Gordon estas por ni pristudindaj. Generale por nia informa laboro, ni koncentras nian atenton pri la racia analizo de la argumentoj, pri ilia ĝusteco kaj pruvebleco. Sed ni forgesas atenti pri la kontrolo de la malkodado: kion aŭskultantoj kaj legantoj de niaj mesaĝoj pensas pri ili.

Apud la voĉa/skriba lingvo ankaŭ malkovriĝas la korpaj lingvoj. Kiu ne

La 20-an de decembro 1991
forpasis en sia pariza hejmo
Gaston Waringhien
korifeo de la Esperanta kulturo.
Nian februaran numeron ni dediĉas al lia memoro.

jam vidis la brilajn fotoalbumojn de Desmond Morris? Vizageprimoj, pozicio kaj gestoj de la manoj, de la piedoj kaj de la torako, spirmaniero, tensio en la muskoloj ktp rakontas multe pli pri la sentoj de tiu kun kiu ni parolas, ol la vortoj esprimitaj. Ekzistas lernejoj, precipe por vendistoj, kie oni instruas la malkodadon de la korpaj lingvoj kaj kiel eblas trarompi korpajn barilojn kaj krei malfermecon por siaj mesaĝoj. Nova ebleco por pli bone prepari tiujn homojn kiuj volas diskonigi Esperanton.

Furoraj aŭtoroj pri vivstilo, kiel Wayne Dyer, forte emfazas la neceson de persona feliĉo por stariĝi bonajn rilatojn kun aliaj homoj. Ili baraktas kun la ĝenerala socia moralo ke necesas

batali por atingi ion, ke necesas suferi por venki la amon de alia homo, ke konscienc-problemoj estas signalo de virteco . . . Dyer invitas siajn legantojn flankenigi siajn konscienc-problemojn, ĝui la vivon, unuavice flegi sian propran bonfarton. Ju pli oni alproksimiĝas al tio, des pli facilaj, fruktodonaj kaj inspiraj estos la rilatoj kun aliaj homoj. Tiu skolo instruas al ni, ke necesas trovi kontenton kaj feliĉon per sia agado. Aktivulo kiu sentas sin seniluziigita aŭ malfeliĉa nepre ŝanĝu sian agadstilon, aŭ rezignu pri plua agado. Nia agado celas kontribui al la homa feliĉo. Por esti konvinkaj ni nepre mem elradu feliĉon.

Ivo Durwael
Estrarano pri Informado

IKS ne fermis la pordon

Internacia Kultura Servo en Zagrebo kun malĝojo informiĝis pri la enhavo de via artikolo "Kroatio: Tra la ŝtormo" (novembro 1991, p. 213). La sciigo ke "Internacia Kultura Servo fermis sian pordon, eble por ĉiam" ne veras. IKS ne fermis la pordon. Ni laboras en tre malfacilaj kondiĉoj kaj grandan parton de nia prikultura agado en la nuna situacio ni devis dediĉi al la laboro kun la rifuĝintoj. (Pli ol 15% de la kroata loĝantaro fariĝis rifuĝintoj; pli ol 37% de Kroatio estas detruita.)

En tia situacio ni ne neglektis Esperanton. [Pri kelkaj ĵusaj aktivecoj de IKS vd. la rubrikon Loke.]

En la malfacila milita jaro 1991 IKS plenumis 20 jarojn da laboro ekde la fondkunveno, okazinta dum la kunsido de Jugoslaviana Esperanta Junulara



En milito Esperantaj muzoj ne silentas.

Asocio, en Beogrado en 1971. Du jardekoj da Pupteatra Internacia Festivalo, longa listo da Esperanto-eldonaĵoj, ekspozicioj, kulturaj kaj klerigaj aranĝoj, lanĉo de Zagreba Metodo de Esperanto-instruado kaj dudeko da ties nacilingvaj adaptaj . . .

Post du jardekoj da laboro ĉe Internacia Kultura Servo, ĝia multjara direktoro Zlatko Tišljar adiaŭis la postenon de direktoro kaj la laboron de IKS.

Kun siaj dek epostenigitaj oficioj IKS daŭrigas la laboron pri kulturo kaj Esperanto kaj dankas al ĉiuj kunlaborantoj dise tra la mondo por la daŭraj subteno kaj kunlaboro. Internacia Kultura Servo plue funkcias ĉe la sama adreso: Amruševa 5, 41000 Zagreb, Kroatio; tel. 041/424 660, 429 566; telefakso 041/421 294.

Afero de infanoj kaj gejunuloj

Mi apenaŭ ripozis de vojaĝo azia en oktobro, kiam necesis ekvojaĝi afriken en decembro. Mi revenis el Katmanduo kaj direktiĝis al Cotonou. Feris en Nepalo, oficis en Benino. Bildkartoj kruciĝis en la aero, kelkajn atingis unue la afrikaj, poste la aziaj. Ne gravis multe, ĉar bondeziroj svarmis en ambaŭ. Novjaro nestiĝis inter la du vojaĝoj.

Ne scias nun mi, ĉu estas pli ekscite trovi en Katmanduo, en dimanca mateno, la ŝildon "Nepala Esperanto-Asocio bonvenigas vin", aŭ pli belas en Cotonou, je la 5-a matene, flughavene legi "Bonvenon al la Dua Afrika Kongreso de Esperanto". Nun temu pri tiu kongreso, pri DAK.

Naudek personoj ĉeestis la kongreson: 35 el Benino, 20 el Togolando, 8 el Ganao, 3 el Nigerio, 2 el Eburabordo, 1 el Gabono, 2 el Belgio, 3 el Germanio, 6 el Nederlando, 2 el Finnlando, 2 el Svedio, po 1 el Norvegio, Britio, Francio kaj Italio, 2 el Senegalio. Ne multe gravas, ke la ganaanoj malfruis tutan tagon kaj la senegalianoj plenajn kvar. Estis tie ankaŭ postkongresoj por ĉeestis, ĉefe por la eŭropanoj, sed iom da afrikanoj ja devis gvidi ilin. DAK mem daŭris nur tri tagojn. En la 28-a de decembro oni inaŭguris ĝin en la ĉeesto de loka ministro pri turismo, cetere en plena ombro de la prezidanto Tchikpe de la Benina E-Asocio. La 29-a estis la labortago, kaj la 30-an de decembro okazis la solena fermo, kun balo ĝis la 3-a matene. Oni multe parolis en la inaŭguro, ĉefe por la ĉeesto de la telegvidu. La postan tagon necesis diskuti. Ĉar la diskutoj naskiĝas pene, ankoraŭ necesas diskuti pri la fido al Tchikpe kaj la agado de la estraro de Benina Esperanto-Asocio. Multaj volis kritiki tiun agadon, sed ili estis venkitaj en la elektoj, kaj ili ne rajtis ĉeesti. Voĉoj aĉetitaj kontraŭ kelko da boteloj da sukeraĵoj (Coca Cola, Fanta, Sprite, Tip Top, Toniko k.s.). Cetere, eĉ: kotonu-anoj devis aliĝi al DAK per kotizo, kiun ankoraŭ necesas perlabori. Tial ili mankis, kvankam malplenaĵ seĝoj en la salonoj abundis.

La 30-a estis la antaŭlasta tago de la jaro. Oni pretiĝis por la lasta. Tiu silvestra nokto en Cotonou estis ekscita. Forumuzis ĝin infanoj, dancante ĉe la vojrandoj. Ni balis en la antaŭa nokto ĝis satiĝo. Ni vadis horojn kaj

mejojn tra la polvo de Cotonou. Estis tie ia bizara bazaro sen varoj.

Cotonou plenas je truoj kaj konatas ankaŭ kiel Kototru', en kiu nur strato kaj duono estas asfaltitaj. Ne ekzistas urba trafiko, ĉar mankas infrastrukturo. Taksioj svarmas en ĉiujn direktojn. Ĉiu veturo kostas cent afrikajn (du francajn) frankojn (ĉ. 0,67 guldenojn), senrigarde al la distanco. Ju pli da estaĵoj eniras taksion, des malpli koste. Foje ni estis naŭ. Aliokaze estis ses, kun Paolo el Pizo kiel la sepa. La taksio simple kolapsis sub liaj 130 kilogramoj. Li miregis. Ankaŭ ni.



Annsybill, Liv, Simo, Sakari, Anita, Yassi, Douglas

Mi renkontis Henrikon, kiu nomas sin Princo, kaj Sebastianon, kiu estas tio. Kiam lia avo, la reĝo en Kinkinhoué, abdikis, ni festos la finan venkon. Inter-tempo Sebastiano fariĝis faddelegito pri turismo en Cotonou. Lia Pasporta Servo jam ekkfunkciis kaj gastiĝis Martin el Londono, kiu taksie survojis al Lomé. En Palais Royal de Porto Novo loĝas spiritoj kaj vuduoj. Simile en Ouidah, kaj precipe en Aplahoué, survoje de Abomey al Lokossa. Tien la ŝoforo ne volis porti nin, ĉar Edgard mienas grimaco de mortominaco, anoncita de Tchikpe.

En Azové perdiĝis Amy Nilssen krepuske. Ŝin trove trafis Léocadie kaj reĝvidis al la grupo kaj buso. En Ganvie ĉe la lago digestiĝis kelkaj papajoj kaj amasoj da ananasoj. Ben benis la tuton. Li estris kaj estis tie. Birdoj same, fiŝoj simile. Restis nur palisoj kaj kulisoj de iama vilaĝo, por tristoj kaj turistoj.

Kiam ni eklugiĝis el Cotonou al Abigiano, venis sabloŝtormo. Ĝi sendis nian flugmaŝinon al Ouagadougou el miaj supra-voltaj revoj en burkinaj

faskoj. Ni siestis tie kvin horojn kaj ronĝis svedan krakpanon. Mi admiris la kaston de la flughavena bufedo, kiu post horo redonis la ŝanĝmonon al ĉiu aparte kaj senerare.

La akcepton en Abigiano ni ne forgesos. Ni veturis al Adjame kaj okupis la tiean Hôtel du Nord. Ambroise Yassi venis jesi ĉion, kion ni planis kaj faris en Eburabordo. Ni ekskursis ĉiutage. Kiam mankis aliaj celoj, ni iris al la strando de Grand Bassam. Daŭris horon veni tien, sed la sablo sternis sin invite. Mi staris kaj inventaris la sablon. Estis jaraŝnjo kaj oni sciu pri kio kalkuli. En la metiŝta bazaro de Grand Bassam nun mankas pluraj maskoj, kiuj gapas de sur mia hejma muro. Placoj kaj palacoj abundas en la Granda Basamo, ĉefburbo de iamo en Benino.

Koamé lernis la lingvon de Zamenhof en junio, kaj nun estas ĝenerala sekretario de EBEA (Ebur-Borda E-Asocio). Simile pri pluraj aliaj. Nur Séka Hyacinthe iam en la sesdekaj stumbilis super lingvaj problemoj en Balkano kaj renkontis Esperanton tie. Bruno Byuss base buse. Annsybill sopranas, Clara malklaras, Margarethe zumas, Sakari ronĝas maizspikon, arakidoj amuzas Simon, Anita bučas ananason, Amy papajon, Liv akvomelomon. Julian turmentas mangon, Han preparas manĝon. Paolo konsideras novan menuon. Ni revenas el Jacquesville, post streĉa milito kun la anakondoj de ondoj.

Eburbordanoj feliĉas pri la meza aĝo de ni eŭropanoj: 46,16 pro Julio (16) kaj Liv (18). En Afriko Esperanto estas afero de infanoj kaj gejunuloj. Sonas sciencfikcie for de tie. Mi kaj Clara konsentas. En Yamoussoukro, la politika ĉefvilaĝo de eburianoj, monstra klimatizita baziliko atendas 18 000 piajn vizitantojn, kaj dekoj da bulvardaj kilometroj sopiras aŭtomobilojn kaj piedirantojn. Yamoussoukro estas kolosa elefanto en dezerto. Estas baziliko sed mankas al ĝi Romo. Dankon prezidanto Boigny, ni ĉiuj profitis.

DAK do okazis en Benino kaj vostis en Eburio. TAK estos la Tria Afrika Kongreso (de Esperanto). Ĝi okazos en Ganao post du jaroj, en 1993.

Simo Mijolević

Monda lingvo mondopinte

Tio estos jam la tria fojo en Nepalo – kio mi sukcesos? mi pensis en oktobro, flugante super Himalajo. Tiam mi ankoraŭ ne konsciis, ke la nepala Esperanto-movado progresos tion signife.

Mi venis en Katmanduon la 2-an de oktobro; atendis min du lokaj aktivuloj. En kelkaj postaj tagoj mi renkontis ĉiujn aktivulojn – kaj malaktivulojn – kiuj ankoraŭ iom da Esperantaj vortoj memoris. Estis mirinde al mi, ke pluraj el miaj pasintjaraj lernintoj parolis jam kontentige bone; tio signifas, ke ili plenumis sian promeson kaj efektive memstare lernis – tio evidente ĝojigis min.

*“Eĉ se la movado volos
morti, ni malebligos tion
per nia agado.”*

Oktobro en Nepalo estas tempo de plej gravaj festoj. En tiu monato oni kutime emas fari nenion alian krom festi kaj ripozi. Tio donis eblon al efika prepariĝo. Krome, elstara evento de la jaro por la lokaj esperantistoj estis vizito de Simo Milojević, kiu kun siaj amikoj pasigis tie iom da libertempaj tagoj. Tio estis bona okazo por lokaj esperantistoj renkonti la Ĝeneralan Direktoron de UEA, kaj por li vidi la renaskiĝintan movadon.

Tiel kaj tial la novaj kursoj plensukcese komenciĝis la 26-an de oktobro. Gazetaj varbanoncoj, kvankam ili manĝis monton da mono, instigis pli ol 120 homojn veni al miaj enkondukaj prelegoj pri “Monda lingva problemoj kaj esperata solvo – Esperanto”. El tiu amaso eĉ 78 decidis eklerni, do mi devis dividi ilin en tri grupojn. Krome 14 pasintjaraj kursanoj formis kurson por progresantoj. Mi havis ankoraŭ grupon da 10 instruemuloj, kiujn mi klerigadis kaj praktikigis pri sentraduka (rekta) lingvoinstruado.

Same kiel pasintfoje, ankau nun mi havis nenian problemon pri keso. Ne nur la lingva instituto Quest, jam dum pli ol jaro kunlaboranta kun Nepala Esperanto-Asocio, proponis sian instruĉambro, sed ankau la moderna, nove konstruita Lernejo pri Japana Lingvo, en Patano (kurbo ĉe

Katmanduo) disponigis al mi ĉambro. Tio estis grava por tiuj multaj el la lernemuloj kiuj loĝis en Patano.

Mi instruis dum du monatoj, ĉiutage matene kaj vespere, al la menciitaj kvin grupoj. Ili lernis 20 lecionojn de mia intensa kurso. Estas notinde, ke nur negranda parto rezignis. Tio okazis al mi jam duafoje, sed nur en Nepalo pli ol 80% finis sian kurson kaj ricevis atestilon. Se mi komparas tion kun kurso en Tajvano, kie ne pli ol 15% finis, mi konstatas ke nepalanoj estas mirinde persistaj lerni Esperanton. Fakte tio koncernas ankau aliajn lingvojn.



Kelkaj diskutantaj kongresanoj

Instrui Esperanton ne sufiĉas por havi aktivulojn, tial mi instigis ilin organizi piknikojn; ja tiaspeca aranĝo ĉiam amikigas homojn. Tie evoluis kelkaj ideoj, sed plej grava el ili estis kongreso de Nepala Esperanto-Asocio (NEspA). Ni decidis okazigi ĝin la 21-an kaj 22-an de decembro.

La kongreso estis dutaga aranĝo, en kiu partoprenis proksimume 60 personoj en la unua tago, kaj 120 en la dua. Nepala ministro pri edukado promesis veni por disdoni atestilon al kursfinintoj, sed li ne povis realigi tion pro profesia vojaĝo. La kongreso okazis en la fakto pri internaciaj lingvoj de la universitato Tribhuvan, la plej grava en Nepalo. La estro de la fakto estis honora gasto, kaj li favore parolis pri Esperanto. Tri ĵurnalistoj logis la kongreso, vere historia en la pli ol 30 jarojn aĝa nepala Esperanto-movado.

Dum la aranĝo, la prezidanto de la asocio interalie diris: “Antaŭe la

Esperanto-movado en Nepalo mortis, sed nun ni ne permeso ke tio okazu, kaj eĉ se la movado volos morti, ni malebligos tion per nia agado.” En la kongreso aperis enkonduka numero de asocia bulteno *Montejo*, unua poŝtkarto de NEspA, kaj ankau verd-stelaj ĉemizoj produktitaj de loka esperantisto. En kongresa rezolucio oni povas legi belan agadplanon de la asocio, kiu inkluzivas vastskalan instruadon, eldonadon kaj kunlaboron kun organizaĵoj.

Resume, mi devas emfazi ke tiu aktivado evidentigas potencialon dormantan en nepalaj esperantistoj, kiun oni povas funkcigi per ĝusta instigo. Nun ni ne povas antaŭvidi kiel ĉio evoluos. Kvankam plena je espero, la nepala movado estas juna kaj preskaŭ sen sperto. Mankas al ĝi eĉ bazaj aferoj, ekzemple lernolibroj, legolibroj, kasedoj, insignoj kaj ĉio alia, por ne mencii monon, sen kio menui organizaĵo povas funkcii. Nun la asocio havas du klubojn en la valo de Katmanduo: unu en la instituto Quest

kaj alian en la japana lernejo. Krome estas tie multaj aktivemaj kaj fervoraj personoj, sed se ili eksentos mankon de ligo al la internacia Esperanta komunumo, ili rezignos. Tial mi petas vin, skribu al ili almenaŭ gratulan karton, se vi ne povas helpi ilin per esperantaj aŭ per kunlaboro. La adreso: Nepala Esperanto-Asocio, P.O. Box 4098, Kathmandu, Nepalo. Ĉe la sama loko eblas akiri adresejn de nepalaj kongresdemuloj, plejparte studentoj.

Mi kore dankas al ĉiuj geesperantistoj kiuj helpis finance por ke tiu laboro estu realigita. Ankau vi povas kontribui por efektivego de pliaj projektoj celantaj diskonigi de Esperanto en aziaj landoj. Vian mondanacon ĉiam atendas konto destinita nur por tiu celo: United Overseas Bank, Account No. 101-148-219-3, Werdin, Singapore 0104.

Joachim Werdin

Renkontigoj:

La jarfina familia festivalo

Kiu ne aŭdis jam pri la porjunula IS de GEJ, tiu Internacia Seminario, kies nomon diskontigis eĉ furorkanto de "Amplifiki"? Same koninda, sed eble malpli konata estas la Internacia Festivalo (IF), kiun oni okazigas por la malpli junaj junuloj. Ankaŭ ĉi-jare ĝi samtempe, iel komplete, al la IS. Jam la okan fojon, Sensestein apud Kassel (Germanio) gastigis la festivalon.

Por ĝui vere familian festosemajnon kun interesa sed ne tro rigora programo, kolektigis sub la iom severa festivalo-devizo "Lernu, laboru kaj amuzigu kun ni!" entute 120 homoj el 15 landoj kaj el eĉ pli da etnoj.

La kadran temon "La eŭropa familio - en komparo" pritraktis pluraj prelegoj de Litovio ĝis Kroatio - aliaj prezentis la daŭre aktualajn evoluojn en diversaj landoj de Orienta Eŭropo. Krome oni povis klerigi pri endomaj akaroj kaj enakvaj organismoj unuĉelaj, instrui pri instru-metodoj kaj recenzado, diskuti aŭ laborgrupi ekologie, leksikologie aŭ alergie. Ĉar bildoj pli kaj pli gravas en niaj renkontigoj, videblis - krom la kutimaj videofilmoj (ekz. pri Bergeno, pri Eŭropo post dudek jarcentoj), diapozitivoj kaj fotoj - eĉ ekspozicio, kiu faldfolie vidigis cent aspektojn eŭropajn.

Feliĉe por la ĉ. tridek infanoj (kaj por iliaj gepatroj), aparta programo ebligis al ili - sub la gvido de Laima Möller - pentri, triki, tondi, teatrumi, fari maskojn kaj kap-ornamatojn, fari siajn kaj alies vizaĝojn, aŭ miri pri la Mildaj Magiaĵoj de Christoph Müller, kiu speciale por tio transvenis de la IS al la IF, kaj kiu ĝuis eble malpli bruon laŭdon kaj aplaŭdon ol tio kutimas en la fojfoje freneza ekzalto de IS-oj - sed li certe ne malpli plaĉis.



Distriĝis kaj ripozis ankaŭ la plenkreskuloj, kiuj povis amuzigi en la naĝejo aŭ gimnastikejo, promeni en la ĉirkaŭa arbaro, babilu koridore kaj en la "Knajpo", la festivala trinkejo, kiu ofertis eĉ la vinon Esperanto. Ĉiu-vespere eblis partopreni agrablan saŭnadon, ĉu laŭ la antaŭanoncigitaj, severaj dek reguloj de HDP* ĉu ne.

Kvarhora busveturo portis ekskurs-emulojn al la belega Lejpcigo, kie Michael Behr gvidis nin tra la malnova centro, rakontante pri Bach kaj pri historiaj eventoj. Ni vidis la lokojn kie la famaj lundaj manifestacioj ekigis la movadon por forigi la ŝtonigitan ŝtatsistemon.

Ĉiu vespero havis specifan karakteron. Dum tiu de la litovoj, niaj balakt kunfestivalantoj klarigis kaj ludigis al ni tradiciajn jarfnajn ludojn de Litovio. Unu el ili temis pri forterurado de malbonaj spiritoj por nove kaj freŝe komenci la novan jaron: turmaskulo en simpla juta vesto ĉasis la infanojn kaj plenkreskulojn, disdonante kaj -ĵetante nuksojn kaj dolĉaĵojn. Alia vespero hispanigis per flamenkeca dancado de belrobe vestitaj, tre junaj knabinoj diversnaciaj de loka dancgrupo.

La festivalo kulminis, certe, je la Silvestra vespero. Ne ĉiuj eŭforiis por la novjara tradicia saŭkraŭto kun

porĵajo kaj diversspecaj kolbasoj, sed ili havis la kompenson de baroka muziko, kandellumo, botelo da vin'... Inter "klasikaj" rokaĵoj, ĵazo kaj naŭ diversaj plenumoj de "La Bamba", ni plurfoje tostis je la Nova Jaro, laŭ diverslandaj tempoj. Kaj ni dancis, dancis, dancis ĝis la frumateno'...

W. F. Huppertz (Nederlando)

*HDP = Hans-Dieter Platz, la "ĉefo" de la IF

La junaj mond-esplorantoj

Eterna problemo de kurs-gvidantoj por infanoj estas: kiel teni vigla la interson pri Esperanto? Mankas ja nialingva lando, kiu provizus abundon da allogiloj: amuze instruajn vidbendojn, streĉajn televid-elsendojn, rok-kantojn tiel prestigajn por junuloj... Ni ĉiuj scias ke tiun mankon pli ol kompensas la tutmonda dimensio de Esperanto - sed kiel sentigi, vivigi tiun tutmondecon por infanoj?




La Esperanto-klubo en la bazlernejo Freese (San Diego, Kalifornio) jam delonge konas plaĉan rimedon por tio. Ilia organizaĵo *Infanoj ĉirkaŭ la mondo*

Zamenhof-premio al UN-diplomato Sir Brian Urquhart

Sir Brian Urquhart, inter 1974-1986 Asista Ĝenerala Sekretario de UN pri specialaj politikaj aferoj, komisiito fare de UN pri plej malfacilaj diplomataj intertraktoj, fariĝis la kvara ricevanto de la Premio Zamenhof por Internacia Kompreniĝo. La ceremonio okazis la 13-an de decembro en Novjorko, post la deka jarkonferenco de CED pri la temo "Lingvo kaj internacia edukado: Kiajn prioritatojn?".

Servinte kun distingoj en la brita armeo dum la dua mondmilito, Sir Brian Urquhart eklaboris ĉe Unuigintaj Nacioj tuj je ties fondiĝo, en 1945. Li estis persona asistanto de Trygve Lie, la unua Ĝenerala Sekretario de UN. Li servis en diversaj funkcioj, ĉiam rilate pac-gardadon en tiom diversaj regionoj de la mondo kiel Kongo, Cipro, Mez-Oriento kaj Kaŝmiro; li direktis la pac-gardajn UN-trupojn en la Mez-Oriento kaj Cipro, kaj reprezentis UN-on en la intertraktoj por la sendependeco de Namibio. Sir Brian apartenis al la ĉefaj politikaj konsilantoj de la Ĝenerala



Pacienca pac-konstruanto:
Sir Brian Urquhart

Sekretario. Li publikigis i.a. biografion de Dag Hammarskjöld, la dua Ĝenerala Sekretario de UN, kaj siajn memorojojn pri la jaroj pasigitaj ĉe Unuigintaj Nacioj.

La Zamenhof-premio, kiun ĝis

nun ricevis Robert Mueller, eksa Asista Ĝenerala Sekretario de UN, nun rektoro de la Kostarika Pac-Unuigintato; Amadou Mahtar M'Bow, eksa Ĝenerala Sekretario de Unesko, kaj James P. Grant, Ĝenerala Direktoro de UNICEF, estis lanĉita de UEA por rekoni kaj subteni homojn kiuj notinde kontribuis al la afero de internaciaj kompreniĝoj kaj komunikado.

Per la aljuĝo de la premio, UEA klinas la kapon antaŭ la meritoj de homo kiu servis kun granda sindediĉo la aferon de mondpaĉo kaj internacia kompreniĝo en tempoj de grandaj politikaj ŝanceliĝoj, decidaj por la homara estonteco mem. Lia vivoverko estis antaŭeniigi Unuigintaj Nacioj, tiun noblan eksperimenton de tutmonda ordo, kiu hodiaŭ pli kaj pli sentigas sian mildigan influon en la okazaĵoj de la mondo. Sir Brian, veterano de la dua mondmilito, faris sia tutviva celo ke glavoĵi ŝanĝiĝu je vortoj, kaj vortoj fariĝu pac-agoj. Apenaŭ eblus trovi pli grandan sinferon por la internaciaj komunikado kaj kompreniĝo kiel ĉe la premiito, kiu en sia tuta vivo strebis por la interproksimiĝo de homoj, laŭ spirito frate simila al la ideo de la esperantistoj.

celas enkonduki Esperanton al infanoj ĉie; helpi al infanj grupoj interkomuniki kaj lerni unu de la alia; proponi kaj interŝanĝi malmultekostajn instruilojn. Ila samnoma revuo kunvenigas sur siaj paĝoj: pandon el Ĉinio, migrantajn birdojn el Hungario, fiŝkaptistojn el Jugoslavio, krucenigmon el Bulgario, tri musidojn el Moskvo, eĉ balenon el Litovio... Kia bunta zoo!




La ok-landa korespondado de la klaso jam fruktis la libreton *Ni esploru la mondont*, kiu prezentas la flagojn, riverojn, bestojn ktp de iliaj literamiko en Britio, Ĉeĥoslovakio, Ĉinio, Finnlando, Francio, Litovio, Pollando kaj Usono. Ĝin vi povus akiri, samkiel *Dek fabelojn* de Charlotte Kohrs kaj Dorothy Krüger, eĉ ilia ĉi-suba adreso.

En 1992 la geknaboj el San Diego proponas novan lernigan ludon – al ĉiuj esperantistoj, ĉie. Ĝia nomo estas: MONDO-RONDO. Same kiel sur sia simbolo infanoj ĉie ĉirkaŭ la mondo mantenas sin, tiel la leteroj de la Mondo-Rondanoj povus formi unu grandiozan brakumigon tutmondan. Unua paŝo: Infangrupo *kune* verku du-tri mallongajn frazojn pri interesa bildkarton, aŭ pri la geografo, bestoj, moroj, popoloj ktp de sia lando. Se la teksto bezonas korekton aŭ Esperantan tradukon, vi kiu legas la artikolon, helpu ilin pri tio. Due: *Infano* kopiu la Esperantajn frazojn klare kaj *presliterate* sur la bildkarton. Trie: Sendu la bildkarton al partoprenanto de la projekto.

Por esti listigita kaj ricevi la aktualan liston de ok el la aliaj partoprenantoj,

la grupo unue sendu tian bildkarton al: La Esperanto-Klubo, Freese Elementary School, 8140 Greenlawn Drive, San Diego, CA 92114, Usono. Notu, ke koncludanto povas fariĝi ia ajn infangrupo, eĉ gefratoj el familio. Sed la ideo estas starigi korespondadon inter grupoj! La helpanta plenkreskulo ne necese devas esti instruisto.

Eble vi ankoraŭ ne sentas tiel, sed la lernojar rapide finiĝos. Do, kaptu skribilon – kaj ekhva bildkartajn amikojn ĉirkaŭ la mondo!



Interskipe: *maldekstra: Mark Fettes, dekstra: Ertl*

Ideologo stafetas al memservisto

FETTES: Forlasi siajn landon kaj medion, ŝanĝi okupojn kaj kutimojn por akcepti novan respondecon – tio povas esti turnopunkto en ies vivo. Kio decidigis vin kandidati por la redaktora posteno?

ERTL: Ju pli mi konatiĝas kun la movado, des pli mi volas scii pri ĝi. Maliculoj dirus: ju pli oni eniras marĉon, des pli oni enkotiĝas... Nu,




serioze, mi supozas ke la plej bone informita esperantisto en la mondo estas la redaktoro de la revuo *Esperanto*. Ĉiuj vojoj kondukas al Romo – kaj en mia kazo al Roterdamo. Multaj surpriziĝas je unua vizito al la Centra Oficejo: ĉu la plej multemembra Esperanto-organizaĵo centras tiom modeste? Kiam mi vizitis ĝin unuafoje en 1988, mi jam sufiĉe bone orientiĝis en la movado por ne atendi ion spirhaltigan, sed mi pensas ke la ĝustajn dimensiojn de la agado de UEA kaj de ĝia CO mi povos vere ekkoni nur surloke, vidante la manojn kiuj movas la fadenojn... Krome, plej allogas min la eblo konatiĝi kun ĉiam novaj homoj, trovi la movadon ĉiam pli interesa. Ĉu miaj esperoj estas pravaj?

FETTES: Nepe: ankaŭ min plej fascinas, tra la pasintaj kvin jaroj, la homa bunteco de nia movado, la granda

Paca reĝimŝanĝo okazas dum januaro en la redaktora ĉambro de nia revuo. Dum István Ertl legas manlibron pri streso, Mark Fettes jam revas pri nordaj arbaroj.

diverseco de rektaj kaj skribaj kontaktoj. Sed oni tamen spertas ilin alie, estante oficisto. La meza movadano dediĉas al Esperanto sian libertempon; dungito de UEA emas ĝuste eviti renkontigojn, malpli "esperantumas" en la kutima senco. Paradoke, ofte mi sentis min izolita en Roterdamo. Versajne iu grado de distanciĝo estas neevitebla, kaj estas feliĉe ke tamen okazadas vigligaj kontaktoj kun kelkaj el la homoj kiujn UEA priservas. Tiaj kontaktoj – ĉu letere, ĉu persone – donas la certigon ke nia laboro vere valoras.

Sed dum la oficistoj iom distanciĝas de la Esperanta socio, ni ankaŭ havas problemojn integriĝi en la nederlandan. La tempo post la laboro ne sufiĉas. Eble vi pli sukcesos pri tio – vi jam devas jongli per tri kulturaj apartenoj en via vivo, ĉu ne?



ERTL: Lastatempe, jes: dum 1990-91 mi instruis pri la originala literaturo en la Esperanto-fako de la Universitato

Eötvös Loránd, sed mi ankaŭ pedagogis en liceo (pri la franca kaj latina), elfrancigis beletraĵojn por eldonoj, kaj laboris por literatura radio-programo. Ekloĝi en Roterdamo signifas do perdi la rektan kontakton kun la hungara kulturo, kiu formas unu pinton en mia kultura triangulo interna, hungara-franca-Esperanta – kaj forlasi mian familion, en kies sino mi ĉiam vivis. Aliflanke, ĝis nun per Esperanto mi precipe vojaĝis, korespondis kaj beletrumis; kompreneble do, ke ĉi tie mi preskaŭ ebruiĝas pro la proksimeco de tiom da esperantigoj... Kion vi mem forlasos, reirante al Kanado?



FETTES: Ne Esperanton, almenaŭ! Ĝi plu ludos sufiĉe gravan rolon en mia vivo. Kompreneble, mankos al mi la intenseco de la kontaktoj; sed aliflanke, dum la lasta jaro mi sentis ke mi eventuale povus pli multe fari, ne estante redaktoro. Kaj en Kanado mi reakiros kelkajn aferojn tre gravajn por mi: socian kontaktaron, profesiajn perspektivojn, arbarojn kaj montojn. Precipe la manko de tiuj lastaj ĉiam premis sur mian animon en la ebena, ŝajne ĉie pavimita Nederlando. Dum kvin jaroj mi devis kvazaŭ anestezi parton de mi mem, kaj ĝi jam komencas stamfi...

Stamfas ankaŭ la verkista parto, cetere. En Kanado mi intencas okupiĝi kiel sendependa ĵurnalisto: pangajne en la angla, sed ne malpli mi emas verki en Esperanto. Mi celas ankaŭ beletron, eĉ romanon. Konante vin, mi supozas ke ankaŭ vi povus havi similajn planojn. Eĉ estas iom surprize, ke kulturulo kiel vi – do homo malpli movadema ol ekzemple mi estas – akceptas tian ĉi oficistan postenon. Ĉu vi eble volas verki romanon pri la Centra Oficejo?

ERTL: Nu, unue: kelkaj noveloj kaj poemoj ne faras el mi verkiston, malgraŭ membreco en EVA. Due: pripensas, ke multaj verkistoj, intelektuloj elektis, en iu momento de sia vivo, la engaĝigon por la afero en kiu ili kredis – ankaŭ por pli bone ekzoni, priverki ĝin. Se mi iam verkos ion en Roterdamo (nun, meze de la labor-komencaj problemoj, tio ŝajnas fora revo), pri la CO ĝi povus esti nur t.n. “ŝlosila romano”, en kiu ĉiu rolanto formiĝus laŭ iu konkreta modelo. Do, ĉu mi volu frue maldungigi min?

Mi supozas, ke vi mem havas pli konkretajn verkoplanojn. Unu el viaj esoj gajnis Maxwell-premion kaj tradukiĝis en sep lingvoj, dum du aliaj – movadologiaj – elstaris en la Belartaj Konkursoj. En ĉi-lastaj vi esploras ideologiajn aspektojn de nia historio. Ĉu temas pri daŭrigota entrepreno?



FETTES: Jes, fakte tiuj du esoj estas parto de planata libro, kiu enkapas al mi de pluraj jaroj. Estas persone tre grave al mi klopodi kompreni, kial kaj por kio mi aktivas; do mi sentas neeble agadi ĉe UEA, aŭ en la movado entute, sen studadi ĝiajn ĉelojn kaj historion. Kaj do mia libro temos pri la ideologioj kiuj motivas nian entreprenon; ne en la senco de trudata koncepta skemo, sed pli kiel io analoga al la psikologio – tio estas ecoj, kiuj difinas la personecon, kaj ideoj simile difinas la movadon kaj ĝian komunumon. Necesus ĝi klaraj, ekzemple, la ideologiajn bazojn de la Kalocsay-a kaj Waringhien-a vivoverkoj – ĉar eĉ lingvistoduj estas ideologie ne-neŭtraj. Fakte mi scivolos ankaŭ pri via propra perspektivo: kial Esperanto allogas vin?



ERTL: Se mi vere elektu nur la aspekton persone por mi plej gravan, mi ŝatas pensi ke atuta estas la Esperanto-kulturo, kiu antaŭbildas la eventuale venontan tutmondan kulturon *memservan*. Mi celas, ke la kulturaj valoroj estos produktataj kaj konsumataj sen centra interveno, de persono al persono; ili havos malpli definitivan, pli kunkreatan karakteron. (Komputila poŝto jam ekzemplas tion.) En nia originala kulturo la cirkulado de produktoj jam okazas sen multa centrecita interveno, dum la ekzistanta aro de tradukoj kaj adaptaj al Esperanto liveras *kvalitan* specimenaaron el la kulturoj de la mondo, eĉ se – por la *kvanto* atingebla – ankoraŭ indas lerni pli disvastigintajn lingvojn kulturcele. Okazis al mi, ke la informo pri iu verkisto, la instigo legi lin venis pere de Esperanto, kaj poste mi turnis min al alilingva versio de liaj verkoj.


Ŝajnas al mi, ke ankaŭ via iniciato pri Monda Kunagado havas kompareblajn ambiciojn, ĉu ne?

FETTES: Jes, nepre: mi konceptas ĝin kiel tre malcentrigitan reton de homoj, kiuj volas uzi Esperanton por io alia ol la pure movadaj celoj. La problemoj ĉiam estis doni konkretan formon kaj identecon al tiu koncepto: tro abundas ekzemploj de nefunkciantaj fakaj asocioj, por ke oni havu iluziojn pri la facileco de la entrepreno. Eble la ligo al Unesko ŝajnas paradoksa, ĉar oni ofte supozas Uneskon tre centrita, piramidata organizo. Tamen tiu supozo estas same supraj kiel similaj asertoj pri UEA: oni simple ne penas informiĝi, kiel la aferoj vere funkcias. Ĉio poste la fondo de Monda Kunagado en Bergeno pravigas mian fidon, ke la asocio havas realan bazon por prosperi – kaj por fari signifajn kontribuojn al la Esperanta kulturo, tiu memserva, je kiu ankaŭ mi kredas.

ERTL: Kiel vi ririgardas al la jaroj pasigitaj ĉe UEA? Ĉu viaj planoj, eseroj plenumiĝis?

FETTES: Grandparte, jes – kaj personaj kaj laboraj. Alvenante en 1986 kun antaŭvido pri kvinjara restado, mi esperis pli bone ekzoni la movadon: kaj al mia informiteco precipe elgazeta aldongiĝis amaso de persnaj, leteraj, telefonaj kontaktoj. Por ne paroli pri anekdotoj kaj klaĉoj! La CO vere estas la plej bona loko por lerni pri la movado en tutmonda skalo. Rezulte, aliigiĝis miaj perceptoj kaj vivoceloj; sed versajne ankaŭ mi iom kontribuis al aliigo de la bildo kaj direkto de UEA dum tiuj jaroj. Pri tio mi kontentata. Kaj la sperto ankaŭ konsciigas al mi, ke la Esperanto-movado bezonus pli da ĉi tiaj lokoj, kie homoj laboras por ĝi plentempe kaj salajrate, ne nur hodie kaj volentule.

Mi kontentata krome, ke la transdono de la redaktoreco okazas multe pli glate ĉi-foje, ol en mia kazo! Mi alvenis eĉ ne atendante redakti la revuon, por trovi vakan postenon kaj dumonatan malfruon. Espereble vi sentas vin iom pli komforte...




ERTL: Efektive, kvankam la lastaj monatoj alportis multe da ŝanĝoj en mia vivo, kaj laŭ manlibroj pri streso, post tiuj spertoj nun mi devus kolapsi por troa streĉiĝo. Tamen mi kredas ke mi estas sufiĉe kapabla pri adaptiĝo. Mi eĉ iom bedaŭras la antaŭviditan personan stabiligon... Ĝis nun mia studenteco kaj poste eĉ instruisteco ebligis sufiĉe libere vagadi en la mondo, kun sekura familia fono en Budapeŝto. Tion antaŭtaŭas la menciita triangulo, kies franca kaj hungara pintoj simbolas ankaŭ persnaj, korsentajn ligiĝojn. ★

Homa strebado al dia projekto

En la mondo troviĝas diversaj organizoj kiuj fidele serĉas la vojon por reale interkomprenigi la homaron kaj unuecigi la mondon. Unu el ili estas la mondfederisma movado, kies gravecon

Tial ni des pli ĝojas, ke la 14-a Japana Kongreso de Mondfederistoj – kiu okazis la 30-an de oktobro en Kioto (unufoje post 14-jara paŭzo), kun 420 partoprenantoj sub la aŭspicio de



S-ro Degučĉi sur prelega podio

s-ino DEGUČĈI Sumiko, dua majstrino de Oomoto, unuafoje menciis en decembro de 1949. Ŝi poste akcelis la movadon ĉe ĝia fronto, mem farante la jenan tankaon:

*La korvo en tagiĝo de tuta univers',
estas Diprojekte tiu ĉi voj'
kiu gvidas al monda pac'.*

Aliflanke, en la sankta skribo de Oomoto troviĝas jena frazo:

*Ellumigo estas unu; estas
dia projekto regi la mondon unu.*

Tiusence, mondfederismo estis varme bonvenigita de Oomoto kiel tre adekvata movado konforma al ties instruoj, pro kio oomotanoj plene kaj ĝoje aktivis alvoki homojn en siaj regionoj. El tio sekvas, ke, la 14-an de oktobro en 1950 la urbo Ajabe, naskiĝloko de Oomoto, deklaris sin la unua mondanigita urbo en Japanio. Kvin jarojn poste la urbo Kameoka, kie estas la centra oficejo de Oomoto, sekvis kiel la dua mondana urbo.

Ekde tiam ambaŭ movadoj, Esperanto kaj mondfederismo, estas daŭre traktataj kiel nedisigeblaj agadoj de Oomoto. Tamen ŝajnas al ni, ke ekster Oomoto ambaŭ movadoj individue progresis ĝis nun sen multa interkontakto, kvankam en iliaj respektivaj principoj estas komuna celo.

septembre fondita Japana Konsilio de Mondfedera Antaŭenpuŝo – deklaris en la kongresa rezolucio per aldona artikolo, ke mondfederistoj klopodu profundigi la komprenon pri la internacia lingvo Esperanto.

Post bazaj prelegoj pri la kongresa temo “Cele al nova mondordo”, malfermiĝis pritema simpozio kun tri podiaj parolistoj, al kiuj oni disponigis po dek minutojn por iliaj propraj opinioj. Inter ili estis s-ro Kyotaro

DEGUČĈI, prezidanto de EPA (Esperanto-Propaganda Asocio de Oomoto), kiu, parolante pri la temo “Trans la nacioj kaj lingvokulturoj: Pri la neŭtrale internacia lingvo Esperanto”, akcentis jene:

Ni alcelas la novan mondordon surbaze de la kompreno, ke “la homaro estas tuta frataro, kaj la universo estas unu kaj devas simbiozi,” kaj sekve ni kredas, ke ni, ne altrudante la lingvon de unu al la aliaj, tamen devus havi komunan kaj krome neŭtralan, t.e. fratan lingvon.

Por ni mondfederistoj, kiuj deziras la grandan unuecon de la homaro kaj la realigon de la mondpaĉo unu fojon por ĉiam, trans la barilo de la nacioj kaj la lingvaj kulturoj, kun la celo alveni al la nova mondordo, estus dezirinde enpreni Esperanton kiel unu konkretan metodon cele al la estonto, en la mondfederan movadon, kaj kune kun la esperantistoj de la mondo iri antaŭen al la komuna celo.”

Ŝajnas, ke la kongreso havis tro da programeroj kompare kun la destinita tempo, pro kio mankis al la partoprenantoj kontentiga diskuto pri respektivaj bazaj opinioj kiujn entute kvin eminentuloj montris dum la kongreso. Tamen, estas signife ke la Esperanto-movado estis oficiale traktata en la kongreso kiel unu el la konkretaj rimedoj de la homa interkompreniĝo sen lingva diskriminacio.

Inter la partoprenantoj troviĝis pli ol 20 esperantistoj, inkluzive usonan kaj britan, kiuj esperas ke la mondfederistoj bone komprenos la rolon kiun Esperanto povas ludi kiel forte ligata frata movado, por efektiviĝi la mondpaĉon sur la tero.

AGOU Takashi (Japanio)



Esperanto-monumento en Oomoto-Centro, Kameoka



Ĉu ŝanĝi la homojn aŭ nin mem?

Bedaŭrinde, mi ne vidis la anoncon de Internacia Kultura Servo el Zagreb pri la kaŭzoj de la nekontentiga sukceso de Esperanto (julio-aŭgusto, p. 129-130), sed mi volas respondi.

Lau mia observo, pli ol 90% de la homoj sur tia ĉi planedo ne emas paroli kun eksterlandanoj, kaj lernas fremdajn lingvojn nur pro devo aŭ por gajni monon. Ili preferas homojn tute similajn al ili mem. Do, por plipopularigi Esperanton, ni devas aŭ ŝanĝi tiun homan emon, aŭ krei pli da mongajn belecoj por Esperanto-parolantoj.

Nu, la unua taktiko ja estas malfacila. Sed la dua rezultigus, ke la homoj lernas Esperanton nur pro mongajno. Tio estus malavantaĝo por mi (kaj aliaj kiel mi), kiuj lernas Esperanton precipe por amikiĝi kun eksterlandanoj. Kvankam mi vere estas vastan sukceson por Esperanto, ni memoru, ke la manko de tia sukceso ne estas ĉiurilate malbona.

Johan Philips (Usono)

Olomouc: pli okcidenta en oriento

Mi bedaŭras la fuŝeton nomi Olomouc *moldavia* urbo ("Loke", oktobro 1991) – sendube legandus *moravia?* Mi konsilas al ĉiu redaktoro de *Esperanto* funde koni la geografion de la mezgrandaj orienteŭropaj landoj, kie ja troviĝas ĉ. 45% de la esperantistaro.

Richard A. Earnhart (Usono)

Nur poŝton ne eblas subtaksi

Lau la artikolo "Ni ne subtaksu nin" de Johan Hammond Rosbach (novembro, p. 200-201), li petis, de "itala delegito", informon pri literaturo, kaj ne ricevis respondon. Nu, en Italio ekzistas nur tri fakdelegitoj de UEA pri literaturo. Mi ne scias, al kiu el mi s-ro Rosbach adresis sian leteron. Mi nur scias, ke dum la lasta jaro mi ricevis tri informpetojn, kaj mi respondis al ĉiuj. Neniom mi ricevis informpetojn de s-ro Rosbach.

Do, se li skribis al mi, verŝajne lia letero dumvojaĝo perdis. Li ne miru pro tio: bedaŭrinde, en Italio, tio okazas sufiĉe ofte. Do, eble "elreviĝo"... sed nur pri la akurateco de iuj naciaj poŝtaj servoj! Se s-ro Rosbach tiel kompleksas, ke li pacience re-sendas sian peton al mi, volonte, kiel mi povos, mi provos helpi al li.

Carlo Gazzelli (Italio)

Du malsamaj fazoj en Eŭropo

De la 28-a de septembro ĝis la 5-a de oktobro 1991 okazis Esperanto-Forumo en Kaunas (Litovio), pri kiu raportis U. Lins en *Esperanto* (novembro). Plu sentebliis la orientaj riproĉoj al nia preteratento pri tiaj aranĝoj, forumoj, turistaj semajnoj.

Tamen, orienteŭropaj samideanoj, se vi volas viziton de okcidentanoj, sciuj ke ili devos elekti ĉu propran liberton, ĉu la UK-on, ĉu vian seminarion. Ne forgesu, ke en orienta Eŭropo, dum multaj jaroj, movadaj gvidantoj dependis de ŝtatoj kiuj faciligis la vojaĝojn al esperantaĵoj. Tio neniam okazis okcidente.

Mi aludos samtempe ne tiom foran alian fenomenon. Orientantoj superŝutas komercemajn okcidentajn UEA-delegitojn per amaso da proponoj. Plimulto fantazias, kaj ne pritraktindas. Plej ofte: "Mi pretas vendi, pere de vi, ĉion ajn", kaj sekvas listo da ilmaŝinoj, fruktoj, mineraloj, motoroj, kaj ĉiaj landaj produktaĵoj. Ĉio sen vendo-argumento.

Ne enŝoviĝu se vi ne iel spertas pri maklerado, vendo, aĉeto. Se la t.n. merkata sistemo pli-malpli funkcias, tion ĝi ŝuldas al iuj reguloj. Necesas ĉiam detaliĝi kion oni proponas, kun komparo-kriterioj. Iuj emus ĉion ajn proponi; ili ne forgesu, ke tre ni eĉ aĉetisto iras al lernejo por ĉeĝi al aĉeto!

Jean-Louis Texier (Okcidenta Eŭropo)

Red.: Ĉu IKEF povus lanĉi klerigan eldonaĵon pri komerc-kutimoj?

Por demokrata, senpartia MEM

En *Esperanto* de decembro 1991 s-ro Aleksiev, Honora Prezidanto de MEM, en intervjuo konstatas i.a. ke la siglo MEM por multaj homoj, speciale en Okcidento, estas ligita al marksismo. En si mem, kompreneble, pac-movado estas ne marksisma aŭ kapitalisma aŭ simile; sed en praktiko, pluraj funkcioj de MEM tra la jaroj estis politike ne-neŭtralaj. Konsekvence de tio li opinias, ke estus utile ŝanĝi la siglon.

Nu, en Nederlando pasintan oktobron ni fondis propran memstaran MEM-sekcion; ĝia prezidanto, hazarde, fariĝis mi. Kaj nia intenco estas nepre neŭtrale agadi, montri al ne-esperantista publiko ke en porpaca celado estas tre senhave uzi Esperanton, kaj interne de la movado emfazi ke porpaca agado estas nepre ankoraŭ ne superflua afero.

El la fakto ke ni simple retenis la siglon MEM, vi tuj vidas ke la nuran nomon MEM en si mem ni ne opinias io malbona: eĉ male, la siglo estas konata – ĉiu esperantisto iom klara scias ke ĝi iel rilatas al "Paco" kaj "Esperanto" – kaj, laŭ ni, nia estonta agado devos pruvi kiun enhavon meritis la siglo MEM. Agadi por paco – pere de Esperanto!

Gerrit Berveling (Nederlando)

Pagipovaj ĝemeloj

Post tridekjara foresto el la movado, mi re-aligis al UEA antaŭ kelkaj monatoj. Sur la paĝoj de *Esperanto* frapis min la ofta mencio pri homoj, kiuj ne povas membriĝi en UEA nur pro ne-pagipovo. Por helpi ilin, mi proponas novspecan "ĝemeliĝon": ne de urboj, sed de *individuoj*. Ekzemple, se mi ekscias ke s-r(in)o X en lando Y ne povas pagi UEA-kotizon, mi "ĝemeliĝu" kun li aŭ ŝi pagante la kotizon. Ĉu aliaj pretus fari same?

Jacques Verdier (Belgio)

Kvar kritikaj konstatoj

En marto-junio 1991 mi faris enketon pri Esperanto en kelkaj urboj de Liaoning-provinco (Shenyang, Dalian kaj Fushun), en kiuj troviĝas sume 20 000 esperantistoj. Miaj kvar konstatoj probable validas ne nur ĉi-loke. Nome, malgraŭ ke la provinca televido kaj radio antaŭnelonge elsendis Esperanto-kurson, la demanditoj aŭ neniam aŭdis pri nia lingvo, aŭ rememoris varbanoncojn sed miskomprenis ilian mesaĝon. Unue, do: Esperanto ne estas sufiĉe videbla. Due: neniuj organizas la plulernadon por la televidaj kursfinintoj. Trie: kvankam informitaj, multaj opinias Esperanton nelerninda, ĉar ĝia uzokampo ne estas sufiĉe vasta. "Ĝis hodiaŭ mi neniom povis legi teknikajn materialojn en Esperanto", diris al mi teknikisto, delonga movadano. Kvare: mankas kontaktoj. Malgraŭ la plimultiĝo de alilandaj turistoj, ne venas esperantistoj; en la jaro 1991 nur s-ro So Gilsu faris dutagan viziton al Shenyang.

Wu Guojiang (Ĉinio)

Sekretario de Liaoning E-Asocio

Restas nur Kajto

"Nur Kajto kaj la *Sankta Biblio* estas klare ekstermovadaj," oni diris en "Bona atingo, *Bona lingvo!*" (aprilo 1991). Pri Kajto mi ne parolas, sed ĉu la Sanktan Biblion Zamenhof tradukis nur por religio, ne ankaŭ por unueca lingvuzo? Lau mi, ĝi estas *enmovada*, neniel "ekstermovada".

Petro S. Kaiz (Ĉinio)



Verko lingve revolucia

Nova Esperanta krestomatio. Redaktis William Auld. Rotterdam: UEA, 1991. Jubilea Kolekto, numero 5. 509p. 21cm. Bind. 57,00 gld.

Signifa estas la vorto *nova* en la titolo de ĉi tiu kolekto, almenaŭ desence. Ĝi prezentas enhavon tre diferencan de la *Fundamenta krestomatio*. Ĝi ankaŭ alportas vidpunkton lingve liberalan, eĉ revolucian.

La *Fundamenta krestomatio*, kies plej grava aŭtoro kaj korektinto estis Zamenhof, aperis en 1903. Ĝi celis unuecigi bazan stilon kaj gardi la lingvon de dialektoĝi. Klare ĝi havas certan pancecon, eĉ per sia unua vorto, kun la *Fundamento de Esperanto* de du jaroj poste (1905), kiun akceptis la Unua Kongreso – kvankam oni ne oficialigis ankaŭ la *Fundamentan krestomatian*.

En sia antaŭparolo al la aktuala libro, William Auld aludas la eksmodigon de la zamenhova verko, enhave kaj pro la intertempa evoluo de Esperanto. Multaj eroj en ĉi tiu jam ne restis interesaj por la nuna leganto, interalie pro manko de literatura kvalito laŭ ĉi-tempaj kriterioj.

La *Nova Esperanta krestomatio* ne estas nova eldono de la *Fundamenta krestomatia*, sed kolekto malsama, alikarakterata. Prave Auld decidis elekti enhavaĵojn pli legindajn kaj ial per si mem valorajn. Li efektive ambicias “prezenti modestan superrigardon de la reala kulturo de la internacia lingvo” (p. 3). Ni atentu ĉe li tiun vorton *kulturo*, vastasencan, kiu ja inkluzivas verajn literaturajn sed ne estas al ili limigitaj. Entroviĝas ekzemple 31 rearanĝitaj pecoj el la Ekzerco de Zamenhof, krom sekcioj titolitaj “El vivo kaj scienco” kaj “Prilingvaj artikoloj”. Almenaŭ tiaj oni povas konsideri esence neliteraturaj, kvankam ofte valoraj laŭ aliaj kriterioj.

La ceteron de la libro plenerigas bona antologio, kaj prozforma kaj versa. De ĉi tio pli ol cent paĝoj havas karakteron specialan, kiel indikas la sekcititolo “La Esperanta muzo”. Tiuj poemoj viciĝas en la ĉapitroj “Majstro”, “Lingvo”, “Interna ideo” kaj “Aliflanke”. Ofte temas ne tiom pri beletra kvalito kiom pri uzebleco en niaj kluboj kaj kunvenoj. Tio

inkluzivas pecojn bone konatajn, kiel la jenaj de Zamenhof: “Ho, mia kor!”, “Mia penso” kaj “Preĝo sub la verda standardo”. Ankaŭ retroveblas eroj sisteme aŭ aktuale pli-malpli popularaj, ekzemple “La majstro mortis” (J. Baghy), “La tagiĝo” (A. Grabowski), “Kanto de l’ sklavo” (S. Schullhof) kaj similaj.

Koncerne tiun ĉi sekcion eble iujn surprizos versaĵoj ankaŭ literature valoraj, ĉar ekzistas ideo ke ne eblas verki altkvalitajn poemojn pri nia lingvo aŭ aferoj movadaj. Se tio estus tute vera, ĝi konsistigus gravan, eble fatalan, kritikon kontraŭ niaj pretendoj – ĉar tiaj kulturproduktoj spegulas la spiritostatojn de la esperantismo mem,



kiel kvazaŭa ekvivalento por la patriotaj elverŝoj de poetoj naciaj aŭ etnaj. Feliĉe, tamen, per ĉi tiu libro ja aperas tiateme pecoj sukcesaj el vidpunkto ankaŭ literatura, interalie “En amara horo” (K. Kalocsay), “Kiom longe atendi” (B. Price-Heywood), kaj “Absurdaĵo” (R. de Jong).

Pri iuj decidoj de la redaktoro oni povas havi dubojn, kiel en la sekcio “Mondliteraturo”. Ekzemple, kial inkluzivigi parton de *Quo vadis?* de la pola Henryk Sienkiewicz, sed neniom el la grandiozaj literaturoj helena kaj latina?

Kiel en ĉiuj libroj, enestas iuj preskobodolaj kaj aliaj eraroj, eĉ se tre malmultaj. Dokta kolego en Nederlando atentigis pri *ĉoti* sur p. 243, kiu tekstu *ἔστυ*; ankaŭ pri la mistraduko el la latina piednote ĉe p. 120 (*la ingēnia hidalgo Don Quijote de la Mancha*). *Tantum pellis et ossa fuit* ne esperantigu kiel “tiam da haŭto kaj ostoj ĝi havis”, sed kiel “nur haŭton kaj ostojn ĝi havis”. Pri ĉi-lastata tamen

respondecas versaĵe la origina tradukinto mem, kaj ne la redaktoro nek la eldonejo. Rekte kaj ĝene erara, tamen, estas la kunmetaĵo *lastmoment* sur p. 423, linio 5, de “Japana kongreso en pluvego”. Tiaĵo kolizias kun la ekzemplodona aspekto de krestomatiaj.

Sed multe pli grava ol tiaĵo bagatelio estas alio, nome sinteno revoluci-eфика rilate la lingvajon. En la Antaŭparolo ni legas, ke UEA volis “eldoni novan krestomatian, kiu staru kiel *modelo* por la modernaj lernantoj”. Kvazaŭ pli precizige Auld aldonas, ke lia unua celo estas “prezenti tekstojn lingve modelajn”. Aliloke li asertas: “En tiu ĉi libro vi trovos nur verkojn en *imitinda* Esperanto – negrave, kion trovos niaj erumantoj por priĉikani.” Noru, ke tio celas ne simple al la literaturamantoj, sed specife al “la moderna lernanto”. (Ĉiuj miaj kursivoj.)

Ciuj troviĝas en la *Nova Esperanta krestomatia* ankaŭ tekstoj verkitaĵ en Esperanto ortodoksa, eĉ rekte zamenhova. Tamen en multaj trapas formoj neoficialaj de la literatura speco, kiuj ne povas ne ŝtormigi la sangon de konservativuloj. Por pli bone montri pri kio temas, ni specimene listigu kaj prikomentetu vortojn uzitajn de kvar poetoj:

L. H. Knoedt (*La Luzidjo* de Camões, p. 122-127): *predo, lazo, bunto, rara, ĉi* (= ĉi tiuj), *hasto, tarda, opono, dura, feblon, trista, disprodigas*.

R. Rossetti (*Otelo* de Shakespeare, p. 128-133): *predon, bona, putino, ĉi* (= ĉi tiu), *makakoj, povra, hetajro*.

J. Kořinek (“La fraŭlino de la kvara etaĝo” de Seifert, p. 450-452): *trandiligi, trista, haste*.

K. Kalocsay (“Lorelej” de Heine, p. 459): *ĉi* (= ĉi tiu), *trist’, virgino, fascine*.

Tio spegulas lingvouzon kaj vortelekon tre alian ol de tiu Esperanto kiu ĝis nun ni parolis kaj skribis en ordinaraĵ tekstoj. Temas, fakte, pri deklaro almenaŭ implicite favora al inkluzioj en la lingvouzo ĉiutaga de multaj formoj pasintec konsiderataj kiel nur altiliteraturaj, jes, neologismaj.

Konsideru la jenon. Tri el la cititaj aŭtoroj utiligas *ĉi* anstataŭ *ĉi tiu(i)(n)*. Ĉar mallonga kaj eleganta, ĝi jam oftigis en la poezio kaj sporade aperas ankaŭ en la proza literaturo. Kontraŭe *virgino* estas poezio kaj neofita varianto por la kutima *virgulino*. Riĉigaj estas vortoj kiel *predo, lazo, bunto, rara, opono, disprodigas, bona, putino, trandiligi, hastofaste, hetajro, makakoj kaj fascine*. Tamen ĝis nun tiuj kaj tiaj formoj karakterizis precipe la literaturon kaj ĝenerale ne hejmiĝis

en la vulgara Esperanto. Rekte kontroversaj por multaj estos *rara* (malabunda), *tarda* (malfrua), *dura* (malmola), *feblo* (malforta), kaj *trista/trist'* (malgoja/malgojo). Temas pri sinonimoj por *mal-vorto*, kvazaŭ la prototipo de tiuj neologismoj kiujn abomenas la ĝisultuloj.

En la elekto de tekstoj Auld kompreneble ne povis eviti tiaĵojn, ne fordonante tre grandan parton de la plej bonaj beletraĵoj, kaj precipe poemoj, en nia lingvo, t.e. per falsado. Do finfine la "kulpo" estas tiu de la evoluinta Esperanto mem. Tamen la vortoj *modelo* kaj *imitinda* en la Antaŭparolo konsistigas alprenon de certa starpunkto, ankaŭ flanke de UEA.

Tio certe levas gravajn demandojn, kiujn ĝis nun ne sufiĉe affrontis aŭ pritraktis nia komunumo. Ekzemple: kiomgrade niaj bonaj aŭtoroj estas, kiel en aliaj kulturoj, modeloj kaj imitindaj por celoj iufoje ankaŭ komunlingvaj? Kial ni ne simple agnoskas ke ekzistas, apud la ordinara Esperanto uzata por paroli kaj skribi tekstojn ne pretendemajn, ankaŭ varianto literatura, kies specialiaj iom-post-iome meritas oficialigon siakategorian? Ĝis kiam la lingvoelementoj por kiuj kreiĝas niaj poezio kaj arta prozo – nia ĉefa gloro – restos pleje ignorataj de la lernolibroj, kaj kuŝos ekster la atento de nia Akademio? Ĉu, pro tio, ĉi tiun institucion ni renomu la *Akademio de parto de Esperanto*?

Kiel ajn oni interpretos la intencojn de Auld kaj UEA per ilia *Nova Esperanta krestomatio*, la libro montriĝas enhave valora kaj tre pensiga. Ĝi meritas lokon sur la librobretroj de ĉiu persono kiu serioze okupiĝas pri nia lingvo.

Edwin de Kock (Sudafriko)

Tragedieto kun surprizoj

Zamenhof, Doctor Esperanto. Martin Camprubi Puigneró. Hispanlingva. Manresa: eldonejo neindikita, 1991. 78p. 17cm. 12,00 gld.

Jam post la unuaj rolpecoj rimarkeblas ke temas ne pri (2-akta) *komedio* sed pri... *tragedieto*. Kelkaj ŝokaj elementoj estas iom konstantaj, kiel la amikeco de la surprize esperantiĝinta Martin Schleyer, la popoloĉio blinde jen laŭdas, jen fie kondamnas la Majstron laŭ dikto de grekhistoriaj impulsoj, eldiroj de la sinlaŭdanta Zamenhof ("... mi estas revemulo, prognozanto, antaŭdestinita... dua Kristo" p. 15) plus multaj aliaj, kiuj ja ege miskomponas la ĉefan rolon en la verko, se ne la tutan dramon. La teatraĵo tamen sukcesas konservi la atenton vekita, kaj la aŭtoro efektive elkondensis la vivon kaj verkon de Zamenhof, kvankam ne ĉiam fidele. Kroman surprizon donas la ĉeesto de rakontist(in)o nomita Marjorie Boulton (!), tute nenecesa interveno, kiu tamen definitive plifirmigas la impreson, ke finfine temas pri lernejska teatraĵo.

Bonan solvon por prilumi la estontecon de la Zamenhofa posteularo ni trovas ĉe la fino, kie ili kune iniciatas paradon antaŭ la portreto de Ludoviko rakontante pri sia estonto. Eĉ – kial ne konfesi – tiu parto estas iom kortuŝa. Kaj ni sendube povus paroli pri bona fino, se ĝuste tiu "Marjorie Boulton" ne aperus por fermi la verkon per – eĉ se metafore: "... Li estis iom nevoluinta, kompatinga revulo... kun la kapo en la nuboj."

Francisco Veuthey (Argentino)

Skizo pri problemsolvado

Enkonduko al problemsolva originala KJ-metodo. KAWAKITA Jiro. Trad. UJEDA Yosimi k.a. Tokio: Japana Esperanto-Instituto, 1989. 48 paĝoj. 21cm. 10,00 gld.

La etnoĝeografo KAWAKITA Jiro ("KJ") jen tiu ĉi broŝuro mallonge prezentas la historion de sia problemsolva metodo, kies teknikon li ekkonceptis jam ĉirkaŭ 1951 kiam li estis profesoro en Osaka. Ekde 1967 ĝi komencis disvastiĝi tra Japanio "kiel incendio".

En la libreto la kvar bazaj ŝtupoj de la metodo estas priskribitaj: 1. Etikod-farado; 2. Etikod-grupigado; 3. Skemfarado; 4. Buŝa aŭ skriba klarigado. La uzado de etikodoj helpas la solvanton klarigi al si mem la donitaĵojn, ŝajnajn aŭ realajn, de la problemo. Por pli kompleksaj problemoj oni procedu en ses paŝoj: 1. Identigi la problemon; 2. Determini la cirkonstancojn; 3. Diagnozi kaj formuli problemojn; 4. Solvozi kaj laborhipotezoj; 5. Aktivado de solvoj; 6. Programita aplikado de solvoj.

La aŭtoro substrekas ke oni ne povas lerni la metodon per nura legado: necesas praktikado. Tamen ekzemploj ilustrantaj la metodon mankas. Fine oni diskutas tiel disvastiĝi la KJ-metodon tra la mondo sen perdi ĝian kvaliton.

La broŝuro estas nur skiza enkonduko pri la ĉeftraĵoj de la metodo: sescentpaĝa lernolibro japanlingva atendas tradukon. Dume ni povas iom konatiĝi kun la KJ-metodo per tiu ĉi prezento. La stilo estas baza, klasika, kaj tre flue legebla.

Christer Kiselman (Svedio)

Bunta vivo

Work Brings Happiness (Laboro alportas feliĉon). Aŭtobiografia verko de Philip Buttinger. Anglalingva. Londono: la aŭtoro, 1991 (sen indikoj). 236p. + 15p. da ilustraĵoj. 21cm. 15,00 gld.

Principe ĉiu devus serioze konsideri verki sian aŭtobiografion antaŭ ol tro malfruas, eĉ se nur por la familio. Philip Buttinger, konata de miloj da esperantistoj kiuj gastiĝis en lia londona hejmo, majeste plenumis sian "devon", kaj la rezulto estas interesa ankaŭ por pli vasta publiko, ĉar li dediĉis sian vivon

ne nur al sia granda familio sed ankaŭ al la scienco, al korbopilko (speco de korbopilko), al Esperanto, kaj al la humanisma rando de kristana unitarianismo. Liaj junaĝaj spertoj kiel nederlanda SS-ano en la germana armeo (kaj la kialojn por tio vi legos en la libro) formas viglan rakonton indan je spion-romano, kaj katizis ke li dum konsiderinda parto de sia vivo devis kaŝi sin sub falsa nomo unue de la germanoj kaj poste de la aliancoj. Plia rezulto estis, ke malgraŭ siaj diversaj kvalifikoj li ne povis doktoriĝi.

Iom bedaŭrinde el nia vidpunkto, ke Buttinger verkis en (ne perfekta, sed ĉiam bunta) angla lingvo.

Johano Rapley (Nederlando)



Serene kaj serenade el Brazilo

Aerlumo. Komponis kaj kantas Flávio Fonseca. Brazilia: Brazila E-Ligo. 1990. 29,70 gld.

Aaron brazilumas Esperante. Kantas Aaron S. Koenig laŭ aranĝoj de Flávio Fonseca. Rio de Janeiro: Sono-Viso, 1989. 25,50 gld.

La dancinstiga sonoro de Sud-Ameriko sporade atakas popularan muzikon. Dum la pasintaj du someroj flamis granda intereso pri la muzikistoj de tiu bunta kontinento. Eble la esperantistaro de Brazilo konsciis tion, eble ne; ĉiukaze, jen du tre valoraj kasedoj.

En *Aerlumo* Fonseca komponas, aranĝas, tradukas, direktas, ludas, kaj ankaŭ kantas la proprajn muzikaĵojn. Li havas tiun spirecan, gorgan sonon kiun konas la adeptoj de Cleo Laine. Eble tia vualita tekniko ne plaĉas al ĉiuj, sed li verve montras sentivon por siaj poemoj, kaj lia manipulado de la muziko estas respektiga.

La titolkanto *Aerlumo* spegulas la etoson de la kolekto: La verkado de Flávio Fonseca estas neniam prozaĉa; ĝi surprizas, ĝi estas streĉa, pela. Trafas la du pianistoj, unu sola, unu akompana, kaj teksto kun infinitivoj, kiuj aldonas al la etereco de la muziko.

Estas pluraj venoĉaj numeroj, laŭ la simfonia koncepto de Mandalaband kaj Mike Oldfield. *Ekzerco N-ro 3* ŝajnas esti senforma, vagante inter strikte ritmaj "strofoj" kaj kvazaŭa improvizado; tre vigliga basgitaro taktas tri kontraŭ ĉies kvar. En *Janaína* figuras enigma, sintezita fajfado je la eĝoj de la melodio, kontraŭ gitaro, kaj enplektigas gaja interludo. Efektive, nekutima dueto por gitaro (Fonseca) kaj sinteziloj (Nando Carneiro). *Marina* enhavas per mi iom da Ravel kaj Villa-Lobos.

Ĉeĥa poetino Markéta Procházková verkis la poemon *Eĉ se*, kaj ĝi komparas la amon kun la arto lirika. La muziko fluas mole, tiam nervoza interrompo de la piano semas spuron de dubo. Post

*eĉ per muziko mi foriros
eĉ per poemo vin neos*

la orkestro ne povas fini la melodion, ĉar la lasta tono agace malagordas, kaj pugnas inter la skapolojn de la aŭskultanto. Amo kaj muziko denove estas paroj en *Samideanoj* (alivorte, amantoj):

Ondas en ni uvertur' kaj final'...

kun akompano de fluto, perkutiloj kaj tri gitaroj.

Perlena homĉiel' memorigas ke Brazilo estas preskaŭ la hejmo de spiritismo. Rimarkindas plurvoĉa Flávio – malfalcian taskon li donis al si, sed rekompencan.

La portugala *Canto do forte* estas la antaŭlasta numero, poemo verkita de la patrino de la kantisto, kaj ŝi instruas ke "fortulo ne ĉiam estas tiu, kiu sukcesas... la atingo estas rikolto". La tenor-saksfono de David Ganc akompanas, kaj kun tia streĉa ŝanĝado de gamo, la kanto estas la klimakso de la dua flanko. Tamen la fina propono estas la leteroj *Kisojn*, bela epilogo. Mi suspektas ke ĝia simpla liriko rivelas iom de la persona filozofio de Flávio.

Flávio Fonseca kunlaboris ankaŭ en *Aaron Brazilumas Esperante*, kaj cedas la lumon al sia kolego. Eĉ en la unuaj momentoj de *Malagordata* (de la konata Tom Jobin), Aaron S. Koenig ekĉarmas. Lia kapo fojfoje troviĝas inter nuboj, sed la piedoj tamen staras firme sur la tero, kaj preskaŭ ĉiu verbo estas as-a. Li estus ĝustaloka kaj en

varieteo kaj en dancejo, kaj malantaŭ lia voĉo perceptiĝas la aŭtoritata sed zorga mano de Fonseca, kies traktado de la reputaciaj *Knabino de Ipanema* kaj *Sambo de unu noto nur* donas ion novan kaj surprizan al kantoj ofte, kaj bedaŭrinde, gurdataj. La instrumentado ne estas tiel komplika kiel en *Aerlumo*, sed fakte tio tro pezus por la stilo de Aaron – kia bela, natura, senafekta voĉo, lerte uzanta la eblojn de la falso, kaj komplete komforta en la ĝenro de la brazila kanzono, aroma je suno, jazo, kafo, kaj la sudamerikismo *mañana* – ne prokrastu ĝis morgaŭ kion vi povas fari post morgaŭ...

Koenig prezentas verajn klasikaĵojn de la stilo. Li respondecas ankaŭ pri la tekstoj, kaj uzas la lingvon tre refreŝige. La ŝajna (sed fakte trompa) pigreco de ĉi tiu kant-maniero akiras eĉ pli da ritma energio per vortoj multtradikaj: *maldankemegaĉ'*, *travagadinda*, *mal-eviteble* estas nur tri.

L'ansao kaj amikoj ridige serenadas al la amata Mariŝa, kaj virtuoza saksfono, blekante *küem küem*, atencas la mikrofonon.

Brula Atlantiko reeĥas tra la tuta sormento. *La ŝipeto*, *Korkovado*, *Liberhorar'* en *Itapoã*, kaj *Knabino el Ipanema* montras, diversmaniere, la kulturon de la plaĝo kie multe okazas, ĉu naĝado, trinkaĵo en la mano, aŭ nur la amo. *Knabino* plej plaĉas al mi: ĝi estas tiel pentrema, kun juko ritmo kiu priskribas la deziratan inon, kaj trista melodio kiu soras en apenaŭ kaŝita lascivo kaj falas je la konstato ke ŝi estas

*Belulin' kiu ne estas mia
Sola, sed tiom gracia.*

En la interludo aparte menciindas trumpetisto Nilton Rodrigues.

Ĉoltaujo de Brazilo estas la ĝisrevida ero de kasedo domaĝe tro mallonga, kaj ni ĝuas la kantadon de Aaron kaj Flávio kune en numero ilia originala. Ĝia ritmo estas ege koksumiga, kaj certe gustumo de Afriko troviĝas en ĝi. Oni asertas ke

Brazil' estas pli ol sambo kaj futbal'

tamen la karnavala klimato brilas ekzotike el ĉiu muziknoto.

Aaron kaj Flávio do pruvis ke ilia kunlaborado estas senpere fruktodona, kaj la rezulto estas en si mem la plej bona reklamo. Sed ili estonte ne limigu sin al la studio aŭ la podio. La randoj de la Esperanta kulturo pli kaj pli disĝigas, do ili nepre pripensu la eblecojn de la ekrano kaj la teatro.

Seán Osborne (Nederlando)






Ĉiam malnova kaj ĉiam nova. Impresoj pri Prago. Gertrud Schmidt-Bradatsch. El la germana trad. Monika Ludewig. Praha: Ĉeĥa Esperanto-Asocio, 1985. 136p. 21cm. Ilus.. Beletra vojaĝlibro pri Prago; vigila bildigo de la urbo en la 70-aj jaroj. 17, 10 gld.

Franca antologio. Div. aŭtoroj, red. Hervé Gonin. Antaŭparolo de R. Bernard, J. Le Pui, I. Ertl, Trad. R. Bernard, G. Lagrange, G. Waringhien k.a. Paris: Unuĝo Franca por Esperanto, 1991. 396+402+420p. 21cm. Trivoluma. Resuma eldono de la literaturaj kromnumeroj de *Franca Esperantisto*; prozaĵoj kaj teatraĵoj (Molière, Rousseau, Hugo, Flaubert, Cocteau k.a.) de la XVI-a ĝis la XIX-a jc. 127,50 gld.

Gerda malaperis! Instruilero. Horst Gruner k.a. Bonn: Germana Esperanto-Junularo, 1991. 80p. 30cm. Demandoj, ekzercoj, klarigoj k.s. por internacia gruplernado laŭ la romaneto de Claude Piron. 10,80 gld.

Glozel kaj la prahistoria skribo. André Cherpillod. Cougenard: la aŭtoro, 1991. 132p. ISBN 2 906134 16 3. 21cm. Streĉe verkita monografio pri arkeologia mistero, kiu haltigis la spiron de tuta Francio. 29,70 gld.

Kreolsprache und Plansprache. Konfrontative Darstellung von Gemeinsamkeiten zwischen den französischen Kreolsprachen und Esperanto. Benoît Philippe. Wien: Internationales Esperanto-Museum, 1991. 24p. 30cm. 12,90 gld.



Lernolibro de Esperanto / Libër mësimi i gjuhës Esperanto. Vasil Pistoli. Tiranë: Albana Esperanto-Ligo, 1991. 188p. 23cm. Dek ses lecionoj, modeltekstoj kaj ĉ. 2000-vorta Esperanta-albana-angla-franca-germana vortareto. 18,00 gld.

Ludovikologia dokumentaro II. Komencetempaj lernolibroj I. Tókyó: Ludovikito, 1991. 370p. 21cm. Eble neniam kompletigitaj necesaj aldonoj al la PVZ. Kolekto 2. Reprodukto de lernolibroj por germanoj, por anglaj, por judoj (en la jida), kaj por latvoj, el 1888-1889. 57,00 gld.

Ludovikologia dokumentaro IV. Poŝaj lernolibroj. Tókyó: Ludovikito, 1991. 612p.

21cm. Eble neniam kompletigitaj necesaj aldonoj al la PVZ, Kolekto 4. Reprodukto de lernolibroj de Zamenhof. Geoghegan, de Beaufort k.a. el la jaroj 1890-1898. 57,00 gld.

Metodo Lorenz. Curso elemental de esperanto. Délio P. de Souza. Rio de Janeiro: Societo Lorenz, 1991. 90p. 21cm. Tridek mallongaj lecionoj, tradicia metodo. 8,40 gld.

Parolado okaze de la Ŝtata Akto por la Tago de la germana unueco en la Berlina Filharmonio la 3-an de oktobro 1990. Richard von Weizsäcker. El la germana trad. Reinhard Hauppenthal. Saarbrücken: Itis, 1991. 16p. ISBN 3 927613 19 3. 21cm. Grava historia dokumento. 7,50 gld.

Pri Esperanta literaturo (1912). Edmond Privat. Wien: Pro Esperanto, 1991 (4-a eld.). 32p. 21cm. Pionira teoria parolado. 10,20 gld.

Sprachwandel bei einer Plansprache am Beispiel des Esperanto. Benoît Philippe. Konstanz: Hartung-Gorre, 1991. 362p. ISBN 3 89191 480 6. 21cm. Universitata disertaĵo, kiu ekzemplas lingvoŝanĝon en planlingvo per detala esploro pri okazintaj ŝanĝoj en Esperanto. 90,00 gld.

Sur sanga tero. Mozaikromano (1933). Julio Baghy. Postparolo de Vilmos Benczik. Fenikso, 1991 (4-a eld.). 256p. 21cm. Esperantaj Klasikaĵoj 2. Klasika originala romano pri la sorto de hungara militkaptivo en Siberio, daŭrigo de *Viktimoj*. Pionira priskribo de la rusa civila milito post 1917. 30,00 gld.


Vivo estas pli forta, La. Jolanthe Leser. Editoris H. Mayer. Wien: Pro Esperanto, 1991. 36p. 21cm. Ses originalaj noveloj kaj unu poemo de hungar-aŭstra aŭtorino, jam konata kiel germanlingva verkisto. 12,30 gld.

